# Esperanto - genia projekto aÅ- stultaÄµo?

Aldonita de Mato Å pekuljak
17/03/2013

La 16-an de marto 2013 en ejo de Rusa nacia komunumo en Zagreb (str. Trnjanska 35, Zagrebo), Esperanto-sekcio de la kroatia Societo por la rusa lingvo kaj kulturo http://www.ruskijezik.info/esperanto  okazigis aranÄ•on por esperantistoj kaj neesperantistoj interesiÄ•antaj pri "rusaj Esperanto-temoj". Oni prezentis la unuan libron pri Esperanto el jaro 1887, kiun L. L. Zamnehof publikigis en VarÅ•avo (estinta tiam kadre de la Rusia imperio) kaj en la rusa lingvo.

La prezentado starigis antaÅ- Ä‰eestintoj demandon, Ä‰u Esperanto estas genia projekto aÅ- stultaÄµo? Prelegis Mato Åœpekuljak, givdanto de la sekcio kaj prezidanto de la Societo. Li strebis argumenti, ke Esperanto neniukaze estas stultaÄµo, sed tute kontraÅ-e - ke Ä•i estas genia lingva projekto. Kvankam inter aÅ-skultintoj estis ankaÅ- neesperantistoj (prelego kaj prezentado estis farita en la kroata lingvo) neniu el Ä‰eestintoj kontraÅ-argmentis.